ZDRUŽENJE ZA ESPERANTO SLOVENIJE SLOVENIA ESPERANTO-LIGO

# INFORMACIJE INFORMOJ

Leto / jaro 9, št. / n-ro 6 oktober / oktobro 2003

## Zamenhofov dan letos 13. decembra 2003

Letos bo srečanje slovenskih esperantistov ob Dnevu Zamenhofa potekalo predvidoma **13. decembra 2003 med 10.00 in 15.00 uro v hotelu Jeruzalem v Ljutomeru.**

**Predvideni program letošnjega srečanja:**

**10:30** zbor udeležencev v hotelu Jeruzalem (sejna soba v prvem nadstropju)

**11:00** predstavitev knjige Vinka Ošlaka "MJ Esperanto - realnost ali utopija" (mestna knjižnica)

**12:00** ogled ljutomerskega muzeja

**12.45** predstavitev dela ZESa (pogled v letu 2003 in načrti za leto 2004)

**13:30** kosilo v hotelu Jeruzalem (cca. 1300 SIT)

Za **organiziran prevoz** pokličite Anko Vozlič (040 621 646) ali Fani Rižnar (041 897 182), saj predidevamo skupni prevoz z vlakom!

Povezava z vlakom:

Odhod iz Ljubljane ob 7.10 in prihod v Ljutomer ob 10.18

Odhod iz Ljutomera ob 15.10 in prihod v Ljubljano ob 18.45

## Sestanki Združenja za esperanto Slovenije

Redni sestanki članov Združenja za esperanto Slovenije iz Ljubljane so vsako prvo in tretjo sredo v mesecu med 18. in 19. uro v prostoru Oddelka za lokalno samoupravo na Štefanovi 9 v Ljubljani. Naslednji sestanki bodo 3. in 17. decembra 2003. Vabljeni!

## Esperanto NaĝTagoj 2003

Letos bodo esperantski kopalni dnevi potekali **6. do 7. decembra 2003 v Termah Olimia v Podčetrtku.** Vsi tisti, ki se še niste prijavili, pohititite s prijavo.

Prijavite se lahko na e-naslov informoj@volja.net ali pokličite Manco Turk (041 574 554)! Vabljeni!

## Članarina za leto 2003

Skupščina Združenja za esperanto Slovenije ZES je spomladi potrdila nespremenjeno članarino za leto 2003, to je 2000 SIT za zaposlene oziroma 1000 za upokojence in študente.

**Ker gre večina sredstev za razpošiljanje Informacij, bodo te v prihodnje poslane le tistim, ki bodo poravnali članarino za tekoče leto. Članarino poravnajte na transakcijski račun 02015-0012704490.**

Informacije pa lahko seveda brezplačno prejemate na vaš elektronski naslov. Svoj elektronski naslov pošljite na e-naslov informoj@volja.net.

Prostovoljni pripevki za delovanje pa ostajajo neomejeni in so seveda dobrodošli!

## Kotiztabelo de UEA por 2004

UEA je objavila višine članarin za leto 2004. Za Slovenijo veljajo spodaj navedene višine, ki jih lahko poravnate neposredno UEA (glej http://www.uea.org), preko ZESa ali preko delegatov (za Slovenijo: Anka Dvoršak, Maroltova ulica 8, 1000 Ljubljana).

| Kategorio | Kotizo | Priskribo |
|---|---|---|
| MG | 5 eŭroj | Membro kun Gvidlibro tra la Esperanto-movado |
| MJ(-T) | 11 eŭroj | Membro kun Jarlibro (kaj ĝis inkl. 29 jaroj, membro de TEJO kun la revuo Kontakto sen plia abonpago) |
| MA(-T) | 27 eŭroj | Membro-Abonanto: kiel MJ(-T) plus la revuo Esperanto |
| DM | 675 eŭroj | Dumviva Membro: pagas por la tuta vivo 25-oblon de la kotizo MA; ricevas la Jarlibron, la revuon Esperanto, kaj ĝis inkl. 29 jaroj, la revuon Kontakto |
| SA | 16 eŭroj | Simpla abono al la revuo Esperanto, sen membreco en UEA |
| Kto | 10 eŭroj | Abono al la revuo Kontakto, sen membreco en UEA/TEJO |
| SZ | 54 eŭroj | Kotizo por Societo Zamenhof; mecenata kategorio (aldoniĝas al alia kotizo; ne inkluzivas mem-brecon en UEA) |
| PT | 33 eŭroj | Patrono de TEJO: pagas 3-oble la kotizon de MJ(-T) por subteni TEJO (ne inkluzivas membrecon); ricevas la revuon Kontakto kaj aliajn eldonaĵojn de TEJO |

## Tečaji esperanta v Ljubljani v letu 2003/2004

Tudi letos v Ljubljani na Filozofski fakulteti potekata začetni in nadaljevalni tečaj esperanta. Tečaja potekata v predavalnici 6, pritličje levo na Filozofski fakulteti. Začetni tečaj esperanta poteka ob **torkih med 19.00 in 20.30 uro**, nadaljevalni pa **ob četrtkih ob isti uri.** Tečaj bo trajal do predvidoma do marca 2004.

V kolikor se zanimate za tečaj, bi se radi učili esperanta ali nadgradili svoje znanje, nas obiščite v omenjenem terminu. Če bi radi prispevali k uri tečaja, pa vas prosimo, da svoje ideje sporočite na že znan elektrnski naslov informoj@volja.net.

Poleg tega poteka tečaj esperanta tudi preko teleteksta Slovenija na strani 311.

Vabimo vas k sodelovanju, saj boste tudi tako ohranili svoje znanje esperanta, motivirali nove učence ter prispevali k širjenju in uporabi esperanta!

## EŬROPA BUNTO

### Landaj kunordigantoj nepre bezonataj

Saluton,

Vi certe jam aŭdis pri **la manifestacio EUROPA BUNTO**: tiu eŭrop-skala manifestacio okazos **en Strasburgo la 9-an de majo 2004**.

Ĝi estas organizata ĉefe de esperantistoj, kun la apogo de EEU (Eŭropa Esperanto-Unio), kaj ĝi celas kunigi kaj ĉiujn eŭropajn Esperanto-asociojn kaj ankaŭ ĉiujn aliajn neesperantistajn asociojn, kiuj okupiĝas pri lingvoj. La hejmpaĝo http://europa.bunto.free.fr jam disponeblas en 30 lingvoj de Eŭropa Unio (kaj baldaŭ eĉ pli), kaj vi ne hezitu jam anonci tuj la partoprenon de via asocio: ni ĝin aldonos ĉe la paĝo http://europa.bunto.free.fr/asocioj.htm.

Per tiu manifestacio, oni montros la lingvan diversecon de la nova Eŭropa Unio (kiu tiam estos 20-lingva oficiale) kaj espereble konsciigos la publikon (kaj eble politikistojn) pri la fakto, ke necesas agi por konservi tiun mult-lingvecon, kiu ampleksas certe pli ol 50 lingvoj anstataŭ tiuj 20 oficiale permesataj. Plie, eĉ tiuj permesataj lingvoj fakte estas minacaj de la nuna politiko de la Eŭropa Unio, kiu privilegias nur kelkajn lingvojn ĝis ununura lingvo-hegemonio.

Ju pli da homoj kaj da asocioj partoprenos tiun manifestacion, des pli ĝi estos efika: esperantistoj estas inicatintoj de tiu agado, sed ni invitu plej multe da homoj (ĉu esperantistaj ĉu ne) kiel eble por veni. La sukceso de tiu grava eŭropa evento dependas nur de ni!

Do, por kontakti ĉiulingvajn ne-esperantistajn asociojn, ni bezonas landajn (kaj eventuale ankaŭ regionajn, se eblas) kunordigantojn. Ĉiu interesito por iĝi landa kunordiganto anoncu sin al retadreso europa.bunto@eraro.com.

La landaj kunordigantoj estu prefere esperanto-parolantoj (sed ne nepre) ĉar la ĉefa laborlingvo por la organizado de la manifestacio estas Esperanto (la kunordigantoj poste utilos, kiel perantoj por siaj landaj lingvoj).

La tasko de landa kunordiganto estas sufiĉe simpla kaj facila:

- informi kaj inviti sialandajn esperantistojn, Esperanto-klubojn, ktp. por partopreni al la manifestacio (artikoloj ĉe E-gazetoj, mesaĝoj al dissendolistoj…);
- inviti la pri-lingvajn asociojn de sia lando al la manifestacio (mi pretigos modelan invitleteron tradukeblan por tiuj, kiuj bezonas);
- zorgi pri la fakto, ke ĉiu partoprenonta asocio kreŭ siajn banderolojn kaj panelojn por la manifestacio;
- informi la manifestacian kunordiganton europa.bunto@eraro.com pri kiuj asocioj partoprenos (kaj se eblas, pri kiom da homoj proksimume por ĉiu lando venos);
- eventuale (tio estas fakultativa) organizi komunajn transportojn al Strasburgo por sialandaj partoprenantoj.

Ni bezonas havi almenaŭ unu kunordiganton por ĉiu lando de EU antaŭ la fino de decembro 2003: do, se vi estas interesata, bonvolu anonci vin antaŭ tiu dato.

La afero vere urĝas, ĉar la 9-a de majo 2004 alvenos rapidege, kaj ni estu pretaj por tiu dato! La Bruksela Komunidadcentro (BKC) regule sendos novaĵojn pri la pretiĝo de la manifestacio.

Esperante fruktodonan kunlaboradon,

Sébastien Erhard (ĝenerala kunordiganto de la manifestacio)

### Esperanta Eŭrop-Unia kongreso en 2004

En 2004 **la 6a Esperanta Eŭrop-Unia Kongreso** okazos en **Hispanio, de la 25a ĝis la 29a de aŭgusto 2004**.

La elektita urbo estas Bilbao, kiu troviĝas en la norda parto de la lando kaj estas la ĉefa urbo de la hispana aŭtonoma regiono de Eŭskio.

La kongreso ne povus okazi en alia pli taŭga loko, ĉar ĝia temo estos "Eŭropa unuiĝo: Esperanto por multlingva mondo", kaj en Bilbao oni ĉiutage vivas en dulingva medio, kie estas uzataj la Hispana (kastilja) kaj la Eŭska lingvoj.

La Eŭska lingvo estas pralingvo kun nekonata origino. Alia kialo por viziti la urbon estas la longa tradicio de la Esperanta Klubo en Bilbao, kiu estis fondata en la jaro 1906. Dum la Hispana Intercivitana Milito(1936-39) kaj la diktatora periodo de Generalo Franco, Esperanto estis malpermisata en la tuta Lando. Tamen, la movado daŭris sekrete kaj tiel sukcesis renaskiĝi en la jaro 1953.

Ekde la jaro 1957 la Esperanta Klubo de Bilbao havas sian fiksan sidejon en la malnova parto de la urbo, en kvartalo nomata "Casco Viejo". Ankaŭ troviĝas en Bilbao strato nomata "Esperanto". Ĝis la nuna dato la Esperanta Klubo de Bilbao havas preskaŭ 100 membrojn.

Krom la prelegoj atendos vin kultura programo kun treatraĵo, muzikkoncertoj, ekskursoj, ktp. Por junuloj ni speciale organizas apartan programon, inter alie ni bonvenigas JoMo el Francio. Por tiuj partoprenantoj, kiuj eĉ havas pli da tempo resti en Bilbao, indas mencii, ke iom antau la komenco de nia kongreso okazos la plej grava somera festo en Bilbao, nomata la "Aste Nagusia", esperantlingve la "Granda semajno". Dum la dektaga festo "Aste Nagusia" oni povas pli bone konatiĝi kun la Eŭska kulturo. Kutimaj partoj de tiu festo estas gastronomiaj konkursoj, tipaj Eŭskaj sportkonkursoj, inter aliaj la famkontata internacia konkurso pri fajroarto kun profesiaj fajroartistoj de la tuta mondo. Tiuj homoj kiuj malŝatas la tro varman veteron dum la aŭgusta monato povas trankviliĝi, ĉar Bilbao havas mildan klimaton kun someraj temperaturoj, kiuj malofte superas 30 gradojn.

Tamen, troviĝante sur la Kantabria marbordo, pluvo oftas dum la tuta jaro kaj la vetero en la urbo ŝanĝiĝas facile. Por pliaj informoj, bonvolu viziti nian hejmpaghon ĉe la ret paĝo http://www.geocities.com/esperantobilbao/eue.htm.

### Cent esperantistoj el chiuj landoj de la Unio por starigi la "Komitaton por eksperimentado de la Internacia Lingvo en la Eŭropa Unio".

Gekaraj!

Kiel vi eble jam scias, dum la dua renkontiĝo, kiun la "Esperanto" Radikala Asocio kaj la Radikala Partio havis kun la itala Ministro pri klerigo, la Ministro devontigis sin peti al la eŭropaj partneroj ekirigi eksperimentadon de la Internacia Lingvo en la venonta jaro.

Tiu ĉi atingita rezulto malfermas gravajn scenarojn por tio, kion jam en 1992 ni nomis "batalo por la eŭropa federacia lingvo": ĝi devontigas nin lanĉi ekde tuj la starigon de "Komitato por eksperimentado de la Internacia Lingvo en la Eŭropa Unio"! T.e. esperantista komitato, kiu devos havi anojn en ĉiu el la 25 landoj de la Unio, kiuj devos tuj startigi informadon kaj dialogadon kun la respektivaj reprezentantoj en la Eŭropa Komitato pri Klerigo, kies adresojn ni jam ricevis de la Ministro.

La starigo de la "Komitato por eksperimentado de la Internacia Lingvo en la Eŭropa Unio" okazos **en Bruselo che la Eŭropa Parlamento la 7an kaj 8an de decembro 2003**, okaze de Kunveno pri la ĉefaj eŭropaj urĝaĵoj iniciatita de la grupo de la radikalaj Deputitoj ĉe la Eŭropa Parlamento.

Ni devos diskuti pri tio, kiaspecan eksperimentadon ni petu, en kiuj eŭropaj landoj oportunas komenci, kiun aĝozonon ni celu, kiujn celojn ni klopodu atingi kaj en kiom longaj tempoj.

Ni devos interkonatiĝi inter tiuj, kiuj - el ĉiuj 25 landoj de la Unio - volos kunordigi sin kaj esti protagonistoj de tio, kio antaŭanonciĝas kiel la plej granda politika oportunaĵo por Esperanto post tiu ĉe la Societo de la Nacioj komence de la pasinta jarcento.

La radikaluloj devontigas sin pagi al ĉiu partoprenonto la retadkostojn ĉe "Hotel Crowne Plaza", 5-stela, (eskluzivante la ekstraĵojn) kaj la tri manĝojn. Estas antaŭvidata ankaŭ interpretad-servo por Esperanto. La vojaĝ-kostoj estas je ŝarĝo de ĉiu partoprenanto, escepte de dokumentitaj apartaj kazoj por venantoj el Orienteŭropaj landoj, kiujn la interesuloj devos proponi al ni. Por mendoj kaj informoj vi povas skribi al la retadreso info@internacialingvo.org. Ĝisdatigojn vi povos sekvi ĉe la retejo: www.internacialingvo.org.

Amikajn salutojn kaj ĝis revido en Bruselo!

Giorgio Pagano
(Sekretario de ERA)

P.S: Se vi havas la okazon legi tiujn ĉi liniojn, sed vi ne estas interesata partopreni en la iniciato, ni petas vin plusciigi la informon al aliaj, kiuj laŭ via opinio povus au devus interesiĝi.

## Pasporta Servo 2004 estas nun kompilata.

La limdato de la unua de novembro 2003 jam pasis, sed EBLAS ANKORAŭ ALIĜI Aŭ KONFIRMI, kvankam la urboj de tiuj lastsekunduloj tiam eble ne aperos sur la mapoj.

Laŭ la nuna stato, la eldono enhavos 1186 gastigantoj el 76 landoj. Malfeliĉe, mankas ankoraŭ la konfirmoj de 231 (!) gastigantoj el eldono 2003, kiu enhavis 1286 gastigantojn el 80 landoj. ĉu eldono 2004 estos la unua kiu montros malkreskon, post SES jaroj da daŭra kresko?

Krom multaj urboj en ĉiaj landoj, forfalus ankaŭ kompletaj landoj, interalie Antigvo-Barbudo, Bjelorusio, Egipto, Kamerunio, Luksemburgio, Madagaskaro kaj Samoo. Multaj landoj montras gravan malkreskon: -15 Rusio, -14 Bulgario, -12 Ukrainio, -12 Brazilo, -9 Togolando, -9 Pollando, -8 Germanio, -7 Britio (sepa sinsekva jaro da malkresko!), -7 Irano -6, ĉehio, -5 Svedio, Sume 104 malpli.

Krome, 24 aliaj landoj montras malkreskon inter -1 kaj -4, de entute 37 gastigantoj! Feliĉe, aldoniĝos novaj landoj Bolivio, Kongolo kaj Mozambiko, kaj estas ankaŭ kelkaj aliaj pozitivaj rezultoj: 3 Danio, 12 Francio (gratulegon!), 2 Ganao, 2 Kanado, 2 Kongo (Dem Resp), 5 Nederlando, 2 Pakistano, 5 Senegalo, 2 Taĝikio, Sume 35 pli. Krome, 10 aliaj landoj kreskis je 1.

Laste, se iu emas helpi al mi: ankoraŭ mankas kelkaj geografiaj koordinatoj por prepari la mapojn: Brazilo: Formiga, Guaratingueta, Ub? (lasta litero nekonata pro diakritaj problemoj) Germanio: Buxtehude, Kaarst, Hispanio: Granada, Italio: La Spezia, Koreio: Uewang, Norvegio: Hamar, Pakistano: Abbotabad, Mardan, Pollando: Lubsko. Eble utilos jena ligo: http://earth-info.nima.mil/gns/html/index.html.

Korajn salutojn, Derk Ederveen, kompilanto de Pasporta Servo paspserv@wxs.nl, pasporta.servo@tejo.org

Retpaĝojn: http://www.tejo.org/ps, http://www.pasportaservo.org,

YahooGroup: http://groups.yahoo.com/group/PasportaServo

* Pasporta Servo strebas atingi 1300 gastigantojn en eldono 2004! Helpu nin! *

## Vaš kotiček

Nova rubrika v Informacijah je namenjena izmenjavi izkušenj z esperantom, torej lepih vtisov, zanimivosti oz. česarkoli zanimivega, kar bi želeli deliti z drugimi esperantisti. Prispevke pošljite na elektronski ali navaden naslov.

Tokrat objavljamo prispevek kluba Poemo, ki predstavlja nov projekt za Guinessovo knjigo rekordov in vabi k sodelovanju vse zainteresirane.

Karaj samideanoj,
Ni, membroj de la Klubo Poemo (klubopoemo@yahoo.com), volas montri ke estas ebla traduki poemon en ĉujn lingvojn per Esperanto.
Sekve de tio, la libro de rekordoj 'Guiness Book of Records' eble mencios tiun ĉi Esperanton verkon.
Ni sercas esperantistojn kiuj volas traduki la poemon pri mondpaco en sian gepatran lingvon. Ni esperas ke vi volas kunlabori.
Se vi volas fari tion, anoncu vin al ni per la adreso klubopoemo@yahoo.com, kaj vi povus sendi la tradukon poŝte aŭ (se via lingvo uzas latinajn literojn) rete. La rezultoj estos videblaj je la Yahoo-grupo http://groups.yahoo.com/group/klubopoemo/.
Bonvolu samtempe aldoni en vian nacian lingvon:
Tradukita el Esperanto al la <nacia lingvo> fare de <persona nomo>, <lando>

Jen la poemo:

**LA SENTEMPA PARABOLO**
(Penso pri unueco en diverseco)

Iam estis fonto
de la plej pura akvo
oni trinkis el ĝi
sed iuj pensis
diferencajn gustojn esti sentintaj
kaj multa kredis tion.

Tial oni fromis grupetojn
kiuj kreskis ĝis veraj movadoj
kompletaj kun gvidantoj
kaj klankonduto
Kaj baldaŭ pereis
la unua viktimo.

Sed daŭre ekzistas tiu fonto
kaj daŭre fluas sango
cxar daŭre estas klanoj
kiuj ĉiuj asertas esti la solaj
kiuj scias la ĝustan guston.

Gustumu mem
la fonto estas en vi mem.

La fonto en vi mem estas
guto de la prafonto.

La pragutoj en ni mem estas
la unueco en la diverseco
de ĉiuj homoj

Bram Yak, Klubo Poemo (la verkisto)

## Naročilo na revijo MONATO

Vsi, ki bi želeli prejemati revijo MONATO v letu 2004, sporočite svoje kontaktne podatke Jovanu Mirkoviču na e-naslov j.mirkovic@siol.net.

Članarina za leto 2004 znaša 20 EUR, katerih protivrednost v SIT pošljite s poštno nakaznico Jovanu Mirkoviču na naslov:

Jovan Mirkovič

Mirna ulica 5

2000 Maribor

Istočasno lahko naročite tudi knjige iz kataloga, ki se nahaja v reviji MONATO!

## Berite stran 311 na Teletekstu TVS

Še vedno lahko gledalci Televizije Slovenija berejo na strani 311 informacije o esperantu in v esperantu. Vsako vaše pismo bo dokaz, da je za stran zanimanje. Pošljite ga na naslov: Esperanto, Teletekst TVS, Kolodvorska 2-4, 1000 Ljubljana. Po novem je prvega v mesecu nova vsebina, objavljeni pa bodo tudi prispevki, ki bodo prispeli na zgornji naslov prve tri tedne preteklega meseca.

## Prihodnja medarodna srečanja esperantistov

*Internacia Festivalo*, **Kiel, Nemčija, 27.12.2003-03.01.2004, http://www.internacia-festivalo.de**

*Internacia Seminario*, **Naumburg, Nemčija, 27.12.2003-03.01.2004, http://www.internacia-seminario.de**

*Internacia Junulara Kongreso*, **Rusija, 10.-17. julij 2004, http://www.tejo.org/ijk**

*Universala Kongreso*, **Peking, Kitajska, 24.-31.julij 2004, http://www.uea.org**

## Srečno v novo leto 2004

**Združenje za esperanto Slovenije in Klub ljubljanskih esperantistov KLE želita vsem članom omenjenim društev, prejemnikov esperantskih novic in njihovim ožjim družinskim članov, vsem, ki s svojim trudom prispevate k oblikovanju novic, vsem, ki se dejavno vključujete v delo na področju esperanta in vsem ostalim, ki ste kakorkoli povezani z esperantom, srečno, zdravo, predvsem pa uspeha polno leto 2004!**

**Želimo vam, da vam bo tudi leto 2004 naklonjeno na vseh področjih in da boste še naprej spremljali esperantske novice!**






**Odgovorna urednica:** Manca Turk, Klub ljubljanskih esperantistov KLE, informoj@volja.net

Lektoriranje: Janez Jug, Janez Zadravec

Pomoč: Anka Vozlič, Fani Rižnar

**INFORMACIJE / INFORMOJ** izdaja / eldonas Združenje za esperanto Slovenije / Slovenia Esperanto-Ligo, Tavčarjeva 2/I, p.p. 1643, SI-1001 Ljubljana, Slovenija / Slovenio. Matična št.: 1205226. Davčna številka: 93737777. Transakcijski račun: 02015-0012704490.